


LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

Prezidanto: L.J.VAN GULCK, Wolfjagerslei 40, Borgerhout, Antwerpen, Belgujo

Vicprezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7 Constable Road, Ipswich, Anglujo

Sekretario: C. STANLEY OTTO, 7 Longview Road, Livingston, N.J., Usono


Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo




Ni kantu!




Nun manon mi etendas al la promes',



Ho, Dio, mem Vi sendas al mia jes



la povon kaj la forton, ke en memor'



mi havos mian vorton de la honor'.


Ĉi tiu kanto estas verkita de Th.E. Martens, norvega skoltestro, kaj ĝi estas kantata antaŭ la ceremonio dum kiu la aspirantoj fariĝas skoltoj. Traduko: HAR. Melodio: Friedrich Silcher.

Se vi havas taŭgajn skolto-kantojn, ni volonte publikigas ilin. Kanto ĉiam gajigas!

Korespondu:

S-ro Jcao Patricio de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3^o Dt^o, Lisboa I, Portugalujo, deziras korespondi. Li estas 46 jara membro de Portugala Skolta Frataro.

Ĉefredaktoro: Hans Amund Rosbach, Folldal, Norvegujo.



OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

VOLUMO 111 Numero 8 (55)

PRINTEMPO 1964

Nova redaktoro.

Jen venas nun al la laboro
sensperta nova redaktoro -
li estas pastro, jes, sed simpla viro,
kaj nun komencas kun deziro
ke nia "Skolta Mondo" ĉiam restas
ne malpli bona ol ĝi vere estas!
Kaj kun dezir' en akompano
la danko prem' de mia mano
al tiuj, kiuj vere penis
ĝis la gazet' ĉi tien venis!
Sed min vi ĉiuj devas koni,
kaj mi deziras fanfaroni
per prezentad' en rimportreto
de mia mem' kaj mia programeto:
Mi jubileas - jam la dudekkvina jaro
mi apartenas al la esperantistaro,
sed kiel skolto estas vere juna:
la kvina jaro estas tiu nuna.
Dum multaj jaroj loĝis mi ĉe l' maro
glacia, sed nun en la altmontaro.
Kaj la programo: Per eltonde
havigi ion el la tuta mondo,
kaj se membraro estos nur aktiva
"La Skolta Mondo" fariĝos vere viva.
Sur mezaj pagoj venas roman' eta,
ĝi estos al elpreno ĉiam preta.
Kaj - se vi iam volas laŭdi, plendi
- bonvolu tuj leteron al mi sendi!

Via

Internacia kunlaboro estas el plej granda signifo por nia "Skolta Mondo". Lastfoje ni havis priskribon de bumerango. Nun ni donas priskribon de "Katamarano". Ĉi tiun ni "tondis" el la norvega "Speideren", kiu siatempe tondis ĝin el la angla "The Scout". Pli bone estus, se tiuj, kiuj trovas ion el komuna intereso, sendus rekte al la redaktoro.

KATAMARANO

Ni trovis tiun priskribon en "Speideren", kiu tondis el The Scout. La katamarano estas ia kanoto. Origine oni uzis ĝin ĉe la Pacifiko, kaj ĝi konsistis el tri aŭ pluraj traboj kunligitaj per ŝnuroj. En nia tempo ekzistas pluraj tipoj, grandaj en kiuj vi povas sidi velante, ĝis tiu ĉi malgranda, malmultekosta kaj simpla, kiu certe povas doni ĝuon dum la somera ferio. Ĝi ne facile renversigas, sed vi ja devas scii la naĝ-arton antaŭ ol uzi ĝin.

La materialoj necesaj estas:

Ok lignajn pecojn, $\frac{1}{2}$ inĉon dikaj, 8 inĉojn largaj, 9 futojn longaj.

Kvar el mezuro 30X8 inĉoj.

Ses dudekoj da $1\frac{1}{2}$ ' ŝraŭbiloj.

Kvar metalaj, kvadrataj pecoj, 5"x 5".

Oleokoloron kaj flintpaperon.

Unue prenu unu el la grandaj lignopecoj, desegnu sur ĝi arkon de la mezo de unu flanko ĝis la mezo de la longo. Forsegu singarde laŭ tiu linio, kaj uzu la elsegsegitan pecon por desegni sur la alia duono de la trabo. Elsegu ankaŭ tiun

pecon, faru duan trabon precize sama, glatigu ĉion. (fig 1)

Jam vi faris la du vandojn de unu flosilo, kaj vi komencu la kunmetadon. Forsegu 7" - longan pecon el la plej larĝa flanko de la elsegita materialo, alfiksu tiun precize sur la mezo de ambaŭ vandoj. (fig 2)

Premu la du vandojn al pinto, kunfiksu ilin per tri ŝraŭbiloj. Faru la samon en la alia flanko, kvankam vi nun bezonas pli da fortoj pro la 7" peco en la mezo. (fig 3)


Nun metu ĉion renversita sur alia granda trabo, kaj desegnu laŭ la

Flaro:

La mevoj



mallonga
rakonto pri
skoltoj.



1890



Karl iras malrapide tra la arbaro. La arboj estas verdaj, kaj inter la arboj la blubera erikaro kreskas. Ankaŭ ne estas beroj, sed la verdaj folioj kaj la ruĝaj, malgrandaj floroj estas ĉie en la arbaro. Kaj inter la verdaj folioj oni ankaŭ trovas blankajn arbarajn stelojn kaj aliajn florojn. Singarde Karl iras, rigardas la florojn kaj arbojn. De temp' al tempo li elradikigas floron, kiun li ankoraŭ ne posedas en sia herbario. Li intencas plenumi la postulojn al la botanikista taŭg-insigno, kaj tial devas posedi herbarion kun ne malpli ol okdek diversaj floroj. Sed li daŭrigas sian vicon, tre singarde. Li ne faras bruon, eĉ ne branĉeto knaras sub liaj ŝuoj. Jam frue li lernis tion - lia patro ofte iris en la arbaro, kaj la knabo akompanis lin. Kaj tiam la patro diris: Se la bestoj povas vin aŭdi, vi ne povos ilin vidi. La bruo fortimigas ilin, kaj neniam vi vidos la belajn loĝantojn de la arbaro.

Kaj nun Karl iras sola en la arbaro. Li iris de sia hejmo la antaŭan tagmezon, kaj bivakis sub granda arbo. Li portas sian skoltan uniformon, kaj li iras kiel skolto: Ne nur singarde kaj senbrue, sed uzante siajn okulojn kaj orelojn. Kaj li vidas - sed vidas nur arbojn kaj florojn.

Kiam li iris kune kun sia patro, li ankaŭ lernis tion. Ĉar la patro uzis siajn okulojn, kaj silente flustris al la knabo: Rigardu - jen muso, ĝi sidas tie sub la ŝtono. - - La plej eta novo, kaj la muso estas for.

Kelkfoje ili vidis la reĝon de la norvegaj arbaroj. Ho ne, ne la urson. Sed la alkon - ĝi estas la reĝo. Kaj tiam la patro diris: Restu trankvila. Ne timu la bestojn. Ili ne estas danĝeraj, kaj ili ne atakos vin, se vi ne timigas ilin. Komprenoble - en la tempo de la grandaj interbataloj kaj konkursoj por gajni la inon - tiam ili estas danĝeraj. Sed ordinare ne.

Nun Karl aŭskultas - sed aŭdas nenion. La arbaro estas silenta. La vento susuras inter branĉoj kaj folioj, sed la birdoj silentas. La bestoj ne estas videblaj. Kial? La tago estas tiel fremda, preskaŭ mistikplena.

Hodiaŭ matene - kiam li vekigis - Karl vidis sciuron, kiu sidis sur la tero paŝon for - kaj kiu rapidis de tiu loko al pli sekura loko sur branĉo en arbo tuj apud la loko. Sed post tio Karli vidis nenion.

Tamen - jen estas movo. Tie je la blankaj floroj. Kio? Longa serpento kun verda zig-zaga linio sur la dorso. Do - venena serpento, la sola venena serpento en Norvegujo.

Samtempe Karl vidas alian movon. Sed tio ne estas vivo. Tio estas fumo. Kiu faris fajron en la arbaro? Oni ja ne rajtas tion. La jartempo estas seka kaj varma, la leĝo malpermesas la fajrofaradon. Ĝi estas tro danĝera!

Karl rapidas - kaj post kelkaj minutoj li estas ĉe la fajro. Apud malgranda rivereto kun klara akvo estas fajrejo. Tri ŝtonoj estas metitaj tien, kaj tie iu kuirisi sian kafon. Iu - kiu ne konas la regulojn de la arbaro. Li foriris dum la fajro ankoraŭ brulas! Kaj nun la fajro ne plu estas inter la tri ŝtonoj, nun ĝi lekas tra la erikejo, baldaŭ ĝi atakos la arbaron!

Malplena hermetikujo kuŝas apud la fajro, tien ĵetita de tiu - tiu - malskolto. Nun Karl prenas ĝin, plenigas ĝin per akvo, ree, ree verŝas sur la fajron. Feliĉe ke li jam nun alvenis. Post kelkaj minutoj la fajro ne estus tiel facile regebla! Nun la laboro postulis nur momentojn, eble kvin minutoj forpasis ĝis la kafejaro ne plu brulas. La fremdulo uzus nur sekundojn! Sed la fajrobrigado bezonus horojn aŭ tagojn. Kaj kiom da valoroj forbrulus!

La fremdulo do certe ne konas eĉ la plej simplajn detalojn de la arbara leĝo. Jen la fajro, jen la hermetikujo, jen papero. Karl pensas pri tio, kion instruis unue lia patro, poste la skoltgvidantoj: Lasu en la arbaro nenicm - kron danko al la posedanto

Kiu do estas tiu fremdulco? Tie estas postsigno de lia ŝuo. Estas plenkreskulo, ne knabo. La ŝuo = ne nova, la kalkanumo estas neebena. Kaj tie - sur la arbustumpo sur kiu la fremdulco verŝajne sidis - grizaj fadenoj. Lanaj. Verŝajne el la vestaĵo.

Karl notas en la notlibro: Horon. Lokon. Trovojn. Li almetas la fadenojn kaj surpaperigas bildon de la postsigno. Kaj notas sian propran konkludon:

"La paŝlongo indikas, ke la viro estas proksimume 180 cm alta, li portas grizan vestaĵon aŭ pantalonon."

*

Per ŝtono Karl platigas la malplenan hermetikujon, metas ĝin kaj la paperĉifonon sub alian ŝtonon. Kaj ekiras. Vole - nevole le iras laŭ la postsignoj. Kelkfoje ili estas facile videblaj, aliloke li devas el sia kono de la arbaro konjekti la direkton. Ne nur la postsignojn de la ŝuo indikas la vojon: Jen senkapigitaj floroj, jen arbaraj branĉetoj, jen papereto. Papereto - tio ja estas trambileto el Oslo. Kaj ĝi verŝajne ne estas mal-

nova, ĉar ĝi estas preskaŭ nefaldita.

Denove Karl notas tempon, lokon - kaj ĉemetas la bileton. Kaj skribas novan konkludon:

"La fremdulo celas al la Profundlago, kie estas malnova kabano en kiu li verŝajne tranoktos."

Kaj nun Karl rapidas al sia hejmo. Liaj 24 horoj por sola migrado jam pasis, kaj nun li transdonos la notlibron al la skoltestro, instruisto Jensen. Kaj baldaŭ li ricevos la skoltan unuan gradon. Tiam li estas la dua el la mevoj kiu havas tiun.

II.

Karl frapas sur la pordo de instruisto Jensen, la trupestro. "Jen miaj notoj dum la unugrada migrado." Kaj li volas tuj foriri, sed Jensen ne lasas lin tuj. "Envenu! Minuton vi ja povas sidi kaj rakonti".

Jes, Karl scias rakonti. Sed ne dum ĉi tiu momento. La radio elsendas muzikon, sed one interrompas la muzikon:

"Grava atentigo! El frenezulejo eskapis la kvardekkvinjara paciento Tor Brattlien. Oni lastfoje vidis lin en tramo ĉe la fervoja stacio en Oslo, kaj li eble forvojaĝis per la fervojo. Li estas 1.83 m alta, fortika, portas grizan vestaĵon, nigrajn malnovajn ŝuojn, nenion sur la kapo. Li havas bluajn okulojn, brunan buklan hararon, sed estas iom kalva. Le forfuĝinto, Tor Brattlien, facile koleriĝas, kaj tiam estas danĝera. Ni petas, ke ĉiu, kiu vidis lin, raportu al la polico, kaj ke tiuj, kiuj loĝas laŭ fervojoj de Oslo, atentus."

La muziko reludas. Sed Karl tiel subite paliĝas, ke Jensen rigardas lin: "Ĉu vi malbonfartas?" - "Ne, sed ĉu vi ne aŭdis? Mi - mi scias, kie Tor Brattlien estas!" Kaj rapide li rakontas, kaj montras la trofeojn en la notlibro. Tuj Jensen prenas la telefonon kaj vokas la lokan policiston.

*

"Kial vi kredas, ke Brattlien sin kaŝas en la kabanaĉo ĉe Profundlago?" la policisto demandas. Li rigardas al Jensen, sed la knabo tamen respondas: "Rigardu!" Kaj li prenas la notlibron, kaj montras. "Jen la trambileto, jen la grizaj fadenoj, jen la alteco, jen la malnovaj ŝuoj. Mi ja sciis nenion pri li, kiam mi observis lian altecon!"

La policisto rezignis. "Nu - mi ja devas iri al la kabano.

Sed se Brattlien vere estas tie, mi ne povas sola iri. Al kiu mi telefonu?"

"Ne telefonu - mi kuniras," diras Jensen. "Kaj mi" diras la 15-jara knabo.

III.

Tri uniformitoj - viro kun blua uniformo de policisto, kaj viro kaj knabo en la verda uniformo de la skoltoj - rapidas tra la arbaro. La gepatroj de Karl estas telefone konsultitaj, kaj - iom hezite - donis sian konsenton, ke Karl kuniru. Kaj nun ili rapidas. Ne estas tempo observi la musojn kiuj forkuras, aŭ la sciuron kiu rigardas ilin de la alta arbo.

"Jen li iris", diras Karl, kaj montras al postsigno. "Kaj rigardu - tie li perdis sian kombilon". Vere - Kaj en la Kombilo estis kelkaj brunaj haroj.

El la kabano venis fumo. "Li estas tie" flustris Jensen. "Nu ja, ni baldaŭ scios, ĉu estas Brattlien" respondis la policisto.

Kaj la triopo iris al la kabana pordo. La policisto manfrapis. Neniu respondo. Ree li manfrapis, kaj laŭte diris: "Malfermu. La polico volas paroli kun vi." Sed neniu respondis. Tiam li malfermis la pordon.

El la pordotruo venis densa fumo. Kaj tuj poste fajrolangoj lekis tra la truo. La kabano brulas.

La viroj povas nenion fari. Pro tio, ke ili malfermis la pordon, la fajro ricevis novan, viglan vivon, kaj altaj flamoj sin ĵetis tra la pordo. Tamen Jensen kuraĝe agis. Povas esti homo en tiu fajro, li pensis, kaj tuj ĵetis sin en la akvon, tiel ke li tramalsekiĝis, kaj tiam kurtis en la kabanon tra la fajro. Antaŭ la buŝo li premis sian malsekan skoltan skarpon.

En la kabano li povis vidi nenion. Sed li tuj trovis la dormlokon. Tie estis neniu. Kaj - ankaŭ sur la malvasta planko estis neniu homo. Li ne povis serĉi pli, kaj kuris el la fajro denove.

Kune la tri rigardis al la giganta fajro, kun silenta preĝo, ke neniu fajrero flugu en la arbaron. La vento - feliĉe - blovis de la arbaro al la lago, kaj dum la suno malaperis malantaŭ la montodorso, dum la arbaro pli kaj pli mallumiĝas ĉirkaŭ la lago, la ruĝa okulo de la fajro pli kaj pli paliĝas. Gi estis impona, tamen la tri ne ŝatis la vidon.

"Mi devas resti tie ĉi", diras la policisto, "por gardi, ke la fajro ne faros alian, novan fajregon. Ĉu vi volas iri al la

vilago, kaj raporti al la fajrobrigado, ke ili sendu al mi asistanton?"

IV.

La tagon poste la roto de la mevoj kunvenis. La rotestro, Arne, kiu jam antaŭe havas la unu-gradon, gratulas al Karl, ĉar ankaŭ tiu nun trapasis la postulojn de tiu grado. Sed ne tion ili diskutas - la tuta roto nur parolas pri la aventuro kiun travivis Karl dum la hajko.

"Ho - mi ja nur rigardis la fajron. Sed vi devus vidi Jensen. Li kuris en la kaban=on por serĉi eventualan viktimon tie. Li estas kuraĝa!"

La aliaj samopinias. Jensen estas - jes - li estas skolto. Plian laŭdon ili ne povas doni al "la maljunulo".

"Sed kio pri la somero?" Denove Karl. "Ni devas plani".

"Ĉu iu aŭdis ion pri Brattlien?" interrompis Arne. Kaj li aspektas kiel demanda signo. "Ne, nur la novan atentigon en la radio", diras Jens. "Ripetu" komandas la rotestro. Kaj Jens ripetas, laŭvorte. Li estas diligenta skolto, kaj jam lernis tion, ke aŭskulti signifas auskulti.

"Atentu! Tor Brattlien, kiu forkuris el frenezulejo marde, ankoraŭ ne estas trovita. Oni lastfoje vidis lin en Oslo, sed li verŝajne forlasis la urbon per fervojo, kaj eble trapasis tra Nordbygden hieraŭ.

konturoj. Tiel vi
desegnis, kaj elsegos,
la ferdekon de la flo-
silo. Glatigu ĝin.
Poste faru la samon
por la "planko", sed
ĉar vi nun devas kur-
bigi la trabon, vi
devas peti helpon de
alia skolto. Elsegu,
kaj fiksu - post glati-
go - per ŝraŭbiloj.
(fig 4)

Por plifortigo vi al-
fiksu la metalajn pecojn
en ambaŭ flankoj. Uzu
najlojn kun tre grandaj
"kapoj". La metalajn
pecojn vi prenas el mal-
plenaj hermetikuloj.

Duan flosilon vi kreas
sammaniere. Tiujn du vi
metas 14" for unu de la
alia, kaj kunfiksis ilin
per du el la 30' longaj
lignopecoj, precize sur
la mezo, tiel kiel mon-
tras la suba bildo. Tiuj

du traboj ankaŭ servas
kiel via sidloko.

Proksimume 2' for de ĉiu
flanko estas la loko por
la aliaj du 30'. Kaj jam
la plej granda laboro
estas farita.

Kompreneble vi elektas
gajann kolorojn - kaj
kial ne la kolorojn de
via patrolo. Kaj vi tro-
vos taŭgan nomon. Sed
antaŭ ol pentri, vi de-
vas scii, ĉu ĉiu kun-
metaĵo estas akvosekura.
Plej bone ŝmiru per
peĉo.

Tiam vi bezonas remilon.
La plej suba bildo
montras taŭgan tipon.
Pentru dufoje, kaj
fine ŝmiru per resin-
oleo.

Dum vi uzas vian katama-
ranon, portu banpantalon-
ojn.



FIG 1



FIG 2







FIG 3



FIG 4





Ni skoltoj lernas ami la naturon. Ni ne volas, ke la lando, kiun ni amas, simlu al rubejo. En pli fruaj tempoj, la forĵetitaĵoj estis el ligno, metalo, papero kaj aliaj materialoj, kiuj iom post iom perdiĝis, malaperis. Sed la nuntempaj sinte-
taj aĵoj neniam malaperos. Tial la situacio estas pli danĝera ol ĝi estis.

Ni skoltoj promesis fari nian devon al Dio. Tial ni devas gardi nian animon.

Pli frue oni ja aŭdis blafemojn, eble legis maldecan literaturon, vidis ian nebonan teatraĵon.

Sed tiuj impresoj ne estis vere fortaj. Iom post iom ili malaperis. Sed la nuntempaj impresiloj estas vere danĝeraj: La filmo, la radio, la televido donas impresojn tiel profundaj, ke ili restas por ĉiam!

Des pli bone ni gardu la naturon. Des pli bone ni gardu nin mem.

S.E.L. en Norvegujo.

La norvega sekcio de SEL versâjne estas inter la plej malgrandaj de nia Ligo. Tamen ni nun iom antaŭenmarŝis: Dum aprilo 1964 la konsilanta kunveno de Norsk Speidergutt-Forbund (la knab-skolta asocio) enkondukis novan taŭg-insignon: La Esperanto-insignon. La postuloj por tiu insigno estos: La knabo devas montri, ke li skribe kaj buŝe povas uzi la lingvon. La knabo devas koni la organizaĵon internacian kaj nacian de la esperantomovado. SEL estas tiurilate enkludita. La knabo devas koni la signifon de la "interna ideo".

Ni nun planas instrukcian kajeron al tiu insigno, kun mallonga kurso, historio kaj klarigoj. Ni kontaktos la skoltasocion pri eldono de presita kajero.

La skoltinoj jam antaŭe enkondukis la saman insignon.

Pri pankukoj.

Oni skribas al la redakcio: "Mi esperas ke vi metos du plibonigojn en LSM pri pankukoj. Tio devas esti PATO-Kukoj, kaj oni baku ilin HELbrunaj anstataŭ malhelbrunaj." Bonvolu noti tion - almenaŭ la lasta versâjne faras gravan diferencon al la gusto!

Skoltaj kunvenoj dum UK.

Nia Ko Hammer (Wibauterstr 33, Zaandam, Nederlando) prizorgas skoltan kunvenon dum la kongreso en Hago. Bonvolu vin turni al li, se eble jam antaŭ la kongreso. Dum la 50-a kongreso en Tokio nia Douglas Murphy, (7 Constable Road, Ipswich, Britujo) pretas estri skoltan kunvenon.

Sendinto:

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto"

Honoraj Prezidantoj : "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis

KONTINENTA REPREZENTANTO

EUROPO: S-ro Kurt A. van Rossem Hulstijn, Pr. Hendrikweg 44,
Putten (Gld), Nederlando

NACIAJ REPREZENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills,
E.10, Victoria

BELGUJO: S-ro Kamiel van Herp, Juul Moretuslei 312, Wilruk
(Antwerpen)

BRAZILIO: nomota

BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago

FINLANDO: nomota

FRANCUJO: nomota

GERMANUJO: nomota

HISPANUJO: S-ro A. Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32,
Zaragoza

ISLANDO: nomota

ITALUJO: nomota

JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.,
16 Suehirotyo Kitatu, Osaka

KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Bcx 421, Forest, Ont.

NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 33, Zaandam

NORVEGUJO: P.M. Hans Amund Rosbach, Follidal

PORTUGALUJO: S-ro Joao Patricio de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3^o
Dt^c, Lisboa I

SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen

SVISLANDO: nomota

USONO: S-ro C.S. Otto, 7 Longview Road, Livingston, New Jersey

(Presita en Anglujo)

